
**Johano Sárközi — Petro Péter**

# MIA UNUA ESPERANTA BILDLIBRO

## MY FIRST PICTURE-BOOK IN ESPERANTO

## ELSŐ ESZPERANTÓ KÉPESKÖNYVEM



**Versaĵoj, desegnaĵoj, demandoj
el la unuaj 400 vortoj
por komencantoj**

**Poems, pictures, questions with the 400
words in currant use for beginners
with Esperanto - English vocabulary**

**Versek, képek, kérdések a leghasználatosabb 400 szóból
kezdőknek eszperantó – magyar szószedettel**

Desegnaĵoj kaj versaĵoj de **Petro Péter** el ideo de Johano Sárközi

Demandoj kaj lingva revizio de **Johano Sárközi**
(estro de Danubkurbigo Esperanto Grupo – Hungario – Vác)

# E N K O N D U K O

Ĉiu scias, ke malgrandaj kaj grandaj infanoj, eĉ plenkreskuloj pli facile povas ellerni versaĵojn, poemojn ol prozajn tekstojn. Ĉefe, se ankaŭ bildoj apartenas al la versaĵoj.

Tiel mi havis ideon, ke la 400 vortradikojn de la unuaj tri oftecgrupoj de Baza Radikaro Oficiala mi instruu per malgrandaj versaĵoj. Ekz.:

*Sur la seĝo knabin' sidas,*
*Kiun nun mi tre admiras.*

Sed ĉar mia grupkamarado Petro Péter estas pli sperta kaj en la versfarado kaj en la desegnado ol mi, mi petis lin fari versaĵetojn uzante nur tiujn 400 vortojn, sed almenaŭ unuokaze ĉiu estu uzita (la nombro de uzitaj vortoj per kelkaj estas pli ol tiuj 400), kaj al ĉiu versaĵo desegnu ankaŭ konvenan bildon.

Tiun taskon li bone solvis, mi gratulas al li.

Nun sekvas la lernantoj:

Mi proponas, ke unue ĉiu traduku la versaĵojn. Poste ĉiu provu ellerni ilin, rigardante dume la bildon, kal per partoj de la versaĵo karigi kio okazas sur la bildo.

Ne gravas, ke ne sukcesas parkerigi la versaĵojn en la plena tuteco! Estas sufiĉe ellerni unuopajn kunligajn partetojn.

Poste provu respondi al la demandoj, rigardante nur la bildojn, kaj parkere diri la koncernan versaĵ-parton.

Mi esperas, ke tiamaniere tiuj unuaj plej gravaj 400 vortradikoj fariĝos vivantaj aktivaj, kaj ili plifaciligos la kontinuon de la alproprigo de Esperanto.

*Johano Sárközi*

# P R E F A C E

Little children, even adults know, that poems are easier to learn then prose, chiefly if pictures are beside them.

Therefore I've had an idea, to make poems and pictures with the 400 words and suffixes in current use. E.g.:

*There is a girl at the table,*
*She's beautiful and lovable.*

I asked my companion, Peter Péter, to make poems and draw pictures, because he was better at this things.

He has solved the task well. I congratulate him.

Now let's come the students:

I suggest to translate the poems at first, then to learn them by heart looking at the pictures.

It doesn't matter, if you can't learn the poems completely. It's enough to learn some parts connected with others.

After that answer the questions looking at the concerning picture only.

I hope, so the 400 words in current use will become an active vocabulary to make the language learning easier for you.

*John Sárközi*

## E L Ő S Z Ó

Mindenki tudja, hogy a kisgyerekek és a nagyobbak, sőt a felnőttek is, könnyebben tanulják meg a verseket, mint a prózai szöveget, főleg, ha képek is kapcsolódnak hozzá.

Ezért támadt egy ötletem, hogy az Alapvető Hivatalos Szótövek első három gyakori csoportjának 400 szógyökét kis versekkel tanítsam. Pl.:

*Egy kislány ül ott a széken,*
*Aki tetszik nagyon nékem.*

Mivel a csoporttársam, Péter Péter gyakorlottabb a versfaragásban és a rajzolásban, mint én, megkértem, hogy készítsen verseket csak a megadott 400 szót használva, legalábbis minden szót egyszer alkalmazva, és minden vershez rajzoljon hozzáillő képet.

Ezt a feladatot jól megoldotta. Gratulálok neki.

És most következzenek a tanulók:

Javaslom, hogy először fordítsák le a verseket. Utána próbálják megtanulni, nézve közben a képeket, és a versrészletekkel próbálják megmagyarázni, mi is történik a képen.

Nem baj, ha nem sikerül megtanulni a verseket kívülről teljes egészükben! Elég megtanulni egyenkénti kapcsolódó részeket.

Azután próbáljanak meg válaszolni a kérdésekre, csak a képeket nézve, elmondva kívülről a vonatkozó versrészleteket.

Remélem, hogy ilyen módon az első legfontosabb 400 szótő elevenné, aktívvá válik, és megkönnyíti az eszperantó nyelv elsajátításának folyamatát.

*Sárközi János*

1.



Kio estas sur la bildo?
Sur la arbo sidas birdo,
De sur tiu granda arbo
Flugas al ni birdokanto.
Sub la arbo iu staras
Nun por kiu bird' kantadas.
Sub la arbo staras homo,
Kiu venis el la domo.
Birdon aŭdis li nun kanti,
Tial do li devas halti,
Ĉar la kant' tro bele sonas,
Ĝoj' de l' homo plenumiĝas.

Ha, proksime montoj altas,
Ankaŭ tie birdoj kantas.
Multaj birdoj loĝas tie,
Ili bele vivas ĉie.
Estas tia vera ĝojo
Iri sur arbara vojo,
Kaj eĉ vorton plu ne diri,
Belan kanton nur admiri.
Estos pli belega l' vivo
Por la viro kaj virino,
Por infanoj, kiuj amas
Se l' birdetoj belkantadas.

Kie sidas la birdo? Kion faras la birdo? El kio venis la homo? Kial la homo haltis? Kie altas la montoj? Kiuj loĝas en la montoj? Kia estas la vera ĝojo? Kiuj aŭdas la kanton de la birdoj?

## 2.



Ĉe la tablo iu sidas?
Jes, jen iu ion skribas.
Patro havas bonan filon,
Kiu tenas nun skribilon.
Tiu knabo kial sidas?
Li leteron longan skribas,
Ĵus li finos almenaŭ,
Povas sendi ĝin morgaŭ.
Nun ekstere vesperiĝas,
La venteto trankviliĝas,
Dormi iras jam la suno,
Nun naskiĝas la mallumo.

En la hejmo paco regas,
Dum la patro libron legas,
Rigardadas la edzino,
Kion faras la knabino,
Kiu montras siajn fingrojn,
Kiel la interesaĵojn:
Du, tri, kvar, kvin — ŝi ekkrias —
Ses, sep — diras ŝi kaj ridas —,
Unu kaj ok faras naŭ
— Lernis ŝi ĝin hodiaŭ.
Poste jam la familio
Devos dormi en la lito.

Ĉu sidas iu ĉe la tablo? Kion tenas la knabo? Kion faras la knabo? Kiam li volas sendi la leteron? Kio estas ekstere? Kio estas en la hejmo? Kion faras la patro? Kion faras la patrino? Kion faras la knabino? Kion faras poste la familio?

3.



Hom’ konstruas belan domon,
Ni ne konas lian nomon,
Sed li ŝajnas laborema,
Lia tago valorplena.
Jam la muroj leviĝadas,
Ĉar ĝin laboristo faras.
Li rapide nun laboras,
Siajn manojn bone movas.
En la domo estos pordo,
Por enveni el la korto,
La fenestroj estos grandaj,
Kaj la ĉambroj estos varmaj.

Kiom kostas tiu domo?
Nu, ankoraŭ restu mono:
Ĉirkaŭ l’ domo arboj estu,
Ho, sur kiuj fruktoj kresku!
Sun’ ruĝigu la fruktaron,
Homoj havu dolĉan aĵon;
Estu fruktoj ofte, ĉiam,
Iros la malhavo tiam.
Se la domo preta estos,
Kaj vi iam tien venos,
Povos vidi alveninte:
Estas tie ĉi mirinde.

Kion faras la homo? Kio estos en la domo? Kiaj estos la ĉambroj? Kio kreskas ĉirkaŭ la domo? Kio ruĝigas la fruktojn? Kia estas la frukto? Kie kreskas la frukto?

4.



Kion faras la geknaboj,
La knabinoj kaj la knaboj?
Inter ili paco estas,
La malamo fore restas.
Manojn en la manojn tene
Dancas, kantas ili bele
Pri la paco, amikeco,
Libereco kaj frateco.
Ili el aliaj landoj
Venis kun la belaj kantoj,
Ĉar necesas renkontiĝoj
Al popoloj kaj nacioj.

Brunulinoj kaj brunuloj,
Nigrulinoj kaj nigruloj,
Flavulinoj kaj flavuloj,
Blankulinoj kaj blankuloj
Kantas kune: ke nenie
Estu militado fine,
Ne disigu nin koloroj,
Paco regu en la koroj,
Estu do kompreno vera,
La mond' estu jam libera,
Estu ĉiu do amiko,
Kaj finiĝu la milito!

Kiuj kantas kaj dancas? Kio estas inter ili? Kiel ili kantas kaj dancas? Pri kio ili kantas? El kie ili venis? Kion volas la geknaboj?

5.



Fraŭlo nu do kion pensis?
Li hieraŭ ion perdis.
Nun li tion sur la tero
Volas serĉi ĝis vespero.
Post la horo pasas horo,
Sed ankoraŭ la monero
Mankas, kie povas esti?
Li sen mono devas resti?
Preter ĝi li jam foriris,
Kvankam tion li ne sciis,
Ĉar ne rememoris li jam,
Kien falis ĝi kaj kiam.

Nun person' afabla haltas,
La sinjoron ŝi demandas:
— Ho, vi serĉas ion, ĉu ne?
Do permesu serĉi kune!
— Ho — respondas la sinjoro —,
Nun perdiĝis la monero.
La afero estas grava,
Dank' al vi pro helpo brava.
Kredas mi, ke nun ni ambaŭ
Do ekvidos jam ĝin baldaŭ.
Kaj jen: laste la monero
Tuj eklumas sur la tero.

Kion perdis la fraŭlo? Kion faras la fraŭlo? Ĉu li scias kie ĝi estas? Kiu venas? Kion ŝi demandas de la fraŭlo? Kion ŝi volas fari? Ĉu ili trovis la moneron?

6.



Urbo estas ĉe la maro,
Dekstre apud ĝi arbaro.
Oni diras la arbaroj
Altas ekde centmil jaroj.
Super maro vento kuras,
Post ĝi l’ akvo brile lumas,
Ĝojo brulas en l’okuloj
De la alvenintaj grupoj.
Homoj el trans l’oceano
Venas longe per vojaĝo,
Kaj parole fremdajn lingvojn
Tamen reste ĉi semajnojn.

Jen aliaj senveture
Venas nun piede nure,
Ili ĉion rigardadas —
La turismo bone pagas,
Estos riĉaj la urbanoj,
Sole pro la vidindaĵoj;
La urbestro ne tre timas,
Ĉar la urbo nun riĉiĝas.
Duobliĝas jen la mono
De vespero ĝis mateno,
Kiam ĉiu trinkas, manĝas,
Ĉar la loko ĉiujn ŝanĝas.

Kie staras la urbo? Kie estas la arbaro? El kie la homoj venas? Kiel ili venas? Kion ili faras? Kial estos riĉaj la urbanoj? Kion faras la turistoj de vespero ĝis mateno?

7.



Foje jam ĉevalo blanka
Kun kuraĝa knab’ malgranda
Kontraŭ la konsilo kune
Lasis for la domon, ĉu ne?
Postulante nur por si mem
Rajton nun foriri ien.
Kien? — scias ja la Dio
Kaj la juna ĉevalido,
Kiu ilin sola sekvas,
Kaj la saman senton sentas:
Nun ricevi liberecon,
Per ĝi vidas li rimedon.

Ĉu rimarkon ni bezonas?
Ni rakonti ĉion provas!
Tie ĉi ni plu ne restas,
Nian ĉefon ni prezentas:
Li anstataŭ la manĝaĵo
Batis nin per ĉiu aĵo.
Nek manĝaĵo, nek trinkaĵo,
Tutan tagon laborado!
Estos tiu ajn pli bona,
Komenciĝu vivo nova!
Estas plej bone: foriri,
Kaj la propran vivon vivi!

Kun kiu estas la ĉevalo? Kion ili faras? Kiu sekvis ilin? Kio atendis ilin? Kial la ĉevaloj foriris?

8.



Forta homo portas ujon,
Kunpremante sian buŝon
Tiras etan veturilon,
Certe enmetite ĉion.
Tial estas li feliĉa,
Ĉar l' aĉeto nun facila
Estis, nu sed li nun kvazaŭ
Povas porti jam apenaŭ
La multegajn aĵojn sole,
Helpo povus veni bone.
Jen nelonge laŭ deziro
Venas lia bopatrino.

Petas li ŝin preni ion
Aŭ plutiri l' veturilon,
Dum tra l' arboj vento venas,
La vizaĝojn malvarmigas.
La temp' estas jam malfrua,
La ĉielo klara, pura,
Je la oka do okazis,
Bopatrino kunhelpadis;
Suprenĵete sian kapon,
Kaj uzante vizaĝaĉon,
Volas ŝajni ŝi estrino
Antaŭ sia fil', filino.

Kion faras la homo? Ĉu li povas facile porti la aĵojn? Kiu venis por helpi? Kion petas la homo? Kia vento venis? Kian vizaĝon faris la bopatrino?

9.




Tiu grupo kien iras?
Al lernejo proksimiĝas.
Kia estas ĝia pordo?
Ŝajnas arta tiu formo.
Ĉiu devas ion lerni,
Kaj la librojn nun malfermi,
Scii iom iajn aĵojn,
Kaj por tio lerni jarojn.
Librojn devas ja ellerni,
Pordon de la mond’ malfermi,
Do ellerni ĉiujn partojn,
Kaj ekkoni kelkajn artojn.

Kiu nur duone lernas,
Libron de la scio fermas,
Tiu l’ vivon eĉ ne konas,
Al si mem nenion donas.
Vidu la malbonajn knabojn,
Ili ludas tutajn jarojn
En la kortoj kaj arbaroj,
Ofte kun malpuraj haroj.
Malpuriĝas ĉiuj vestoj,
Kaj disfalas la fenestroj —
La gepatroj kion diras,
Kiam ili hejmeniras?

Kien iras la grupo? Kia estas la pordo de la lernejo? Kion la infanoj faras en la lernejo? Kiuj ne lernas? Kion ili faras anstataŭ lernado? Kia estas ilia vesto?

## 10.



Sur la tablo estas aĵoj,
Ar’ de l’ ĉiaj bonmanĝaĵoj,
Nu, sed simple krom sidilo
Estas apud ĝi nenio.
Staras sole la sidilo,
Ĝin okupas do birdido,
Kies vesto lumoplena
Estas pli ol suno bela.
Poste flugas ĝi sen helpo
Tiel bele kiel vento,
Preskaŭ do jam nur punkteto
Nun videblas el l’ birdeto.

Jen, aĉeti venas homoj
Elveninte el la domoj,
Ho, sed kiaj bonmanĝaĵoj
Nun ariĝas por l’ urbanoj!
En nenia domo estas
Tiom da bonaĵoj, restas
Tie ĉi la homa aro
Manĝi per la manĝilaro.
Iuj nur atendi devas
Ĝis aliaj homoj tenas
Nun prenante en la mano
Pecojn de la manĝilaro.

Kio estas sur la tablo? Kio okupas la sidlokon? Kia estas la vesto de la birdeto? Kiuj venas por aĉeti? Kial ili venas tien?

# VORTARO SZÓSZEDET VOCABULARY

**Kompilis: Petro Péter**

La vortaro enhavas la 400 plej oftajn vortojn, la tabelvortojn, la afiksojn kaj prefiksojn kun kelkaj ekzemploj.
A szószedet tartalmazza a 400 leggyakrabban használt szót, a tabelleszavakat, elő- és utóképzőket néhány példával.
The vocabulary includes the 400 most important words, the table-words, and the affixes with some examples.

| **Esperanto** | **Magyar** | **English** |
|---|---|---|
| aĉeti | vásárolni | to buy |
| -aĉo | silányító képző (*kinézetre*) | *inferiority (for looks)* |
| -adi (*gyakorító i.*) | -gat, -get; -kod, -köd; -gál,-gél | *frequentative (affix)* |
| admiri | csodál | to admire |
| afabla | nyájas, kedves | affable, kind |
| afero | ügy, dolog | affair, thing |
| ajn | bár-, akár- (*névm. után*) | any-, how- (*post adjectives*) |
| -aĵo | konkrét dolog | *concrete thing (affix)* |
| akvo | víz | water |
| al (*elölj.*) | -hoz, -hez, -höz; felé | to (*prep.*) |
| alia | más | other |
| almenaŭ | legalább (is) | at least |
| alti | magasodni | to grow higher |
| *al*veni | jönni | to come |
| alven*inta* | érkező | arriving |
| ambaŭ | mindketten | both |
| ami | szeretni | to love |
| amiko | barát | friend |
| amik*eco* | barátság | friendship |
| ankaŭ | is, szintén | also; …,too. |
| ankoraŭ | még | still |
| -ano | tagja vminek | *member of sg (affix)* |
| anstataŭ (*elölj.*) | helyett | instead of |
| antaŭ (*elölj.*) | előtt | before, in front of |
| apenaŭ | alig | hardly |
| apud (*elölj.*) | mellett | beside, next to, by (the side of) |
| arbo | fa (élő) | tree |
| *ariĝi* | összegyűlni, csoportosulni | to collect, form a group |
| -aro | (*csoportosító. képző.*) | *group of sg (affix)* |
| arb*aro* | erdő | forest, woods |
| arta | mű(vészeti) | artistic |
| arto | művészet | art |
| atendi | várni | to wait (for) |
| aŭ | vagy | or |
| aŭdi | hallani | to hear |
| baldaŭ | nemsokára | soon, before long |
| bati | üt, ver | to strike, beat, hit |
| bela | szép | beautiful, nice |
| bezoni | szüksége van vmire | to need sg |
| bildo | kép | picture |
| birdo | madár | bird |
| blanka | fehér | white |
| bo- | rokonsági képző | …-in-law |
| bona | jó | good |
| *bo*patr*ino* | anyós | mother-*in-law* |
| brava | derék, bátor, jóravaló | brave |

| | | |
|---|---|---|
| brili | csillog | to shine |
| bruli | égni | to burn, flame |
| bruna | barna | brown |
| buŝo | száj | mouth |
| cent | száz | hundred |
| certa | biztos | sure |
| ĉambro | szoba | room |
| ĉar | mert | because |
| ĉe (*elölj.*) | -nál, -nél; -kor | by, beside, next to |
| ĉefo | főnök | chief |
| ĉevalo | ló | horse |
| ĉi | *közelítő szócska* (tie ĉi = itt = here) | *word of approaching* |
| ĉiam | mindig | always |
| ĉie | mindenütt | everywhere |
| ĉielo | égbolt | sky |
| ĉirkaŭ (*elölj.*) | körött; köré (*tárgye.*) | round |
| ĉiu | mindenki | everybody |
| ĉu | (vajon); *kérdést bevezető szó* | *question opening (word)* |
| danci | táncolni | to dance |
| danki | megköszönni | to thank |
| de (*elölj.*) | -tól, -től; óta; birt.e. | from, since ;of (*gen.*) |
| de … ĝis … | …-tól …-ig | from … to … |
| dekstra | jobb | right (*adj.*) |
| demandi | kérdezni | to ask |
| de sur (*elölj.*) | -ról, -ről | from (*prep*) |
| devi | kell | must, have to |
| deziro | kívánság | wish, desire |
| dio | isten | God |
| diri | mondani | to say, tell |
| dis- | szét-, el- | dis- |
| *dis*igi | elválasztani | to part, separate |
| do | hát | well then |
| dolĉa | édes | sweet |
| dolĉ*aĵo* | édesség | sweets |
| domo | ház | house |
| doni | adni | to give |
| dormi | aludni | to sleep |
| du | kettő | two |
| dum | (a)míg, alatt (*időh.*) | during |
| duobla | dupla | double |
| duona | fél, ketted | half |
| -ebla | lehetőséget kifejező képző | -able |
| -eco | elvont főnévképző | *abstraction (affix)* |
| eĉ | még … is | even |
| eĉ ne | még csak nem … is … | even not |
| edzo | férj | husband |
| -ega | fokozó értelmű képző | *increase (of quality)* |
| -ejo | helyiségnévképző | *affix of room* |
| ek- | kezdő ill. pillanatnyi cselekvést jelöl | *affix of inchoative verb* |
| ekde (*elölj.*) | vminek a kezdete óta | since (beginning) |
| ekster (*elölj.*) | kívül | outside |
| *ek*vidi | meglátni | catch sight (of) |
| el (*elölj.*) | -ból, -ből | from |
| el trans (*elölj.*) | vmin túlról | from over there |
| -ema | vmire hajlamos | *inclination to sg (affix)* |
| en (*elölj.*) | -ban, -ben; -ba, -be (*tárgye.*) | in |
| -ero | vminek a legkisebb része | *the most little part of sg (affix)* |
| esti | lenni | to be |
| -estro | -főnök, vezető | chief |
| -eta | kisebbítő képző | *reduction of quality (affix)* |

| | | |
|---|---|---|
| facila | könnyű (eset) | easy |
| fali | esni, hullni | to fall |
| familio | család | family |
| fari | tesz, csinál vmit | to do, make |
| feliĉa | boldog | happy |
| fenestro | ablak | window |
| fermi | zárni, csukni | to close, shut |
| filo | fia (vkinek) | son |
| fini | befejezni | to finish, end |
| fine | végül, végre | at last, finally |
| flava | sárga | yellow |
| flugi | repülni, szállni | to fly |
| foje | egyszer | once |
| for- | el- (igekötő) | … away |
| fore | távol, messze | far (away) |
| *for*iri | elmenni | to go away, leave |
| formo | forma, alak | form, shape |
| forta | erős | strong |
| frato | testvér | brother |
| fraŭlo | legény, nőtlen férfi | bachelor |
| fremda | idegen | strange, foreign |
| frua | korai | early |
| frukto | gyümölcs | fruit |
| ge- | *mindkét nemet jelöli* | *male and female together* |
| *ge*knabo*j* | *fiúk, lányok együttese* | *boys and girls together* |
| granda | nagy | big, large grand-… |
| grand*ega* | óriási | enormous |
| grava | fontos, súlyos | important, heavy |
| grupo | csoport | group |
| ĝi | ő, az (*tárgy, állat*) | it |
| ĝis (elölj.) | -ig (*határ*) | to, up to |
| ĝojo | öröm | joy, pleasure |
| halti | megállni | to halt, stop |
| haro | haj | hair |
| havi (+ tárgye.) | van vmije, birtokol vmit | to have |
| hejme | otthon | at home |
| helpi | segíteni | to help |
| hieraŭ | tegnap | yesterday |
| hodiaŭ | ma | today |
| homo | ember | man |
| horo | óra (*idő*) | hour |
| iam | valamikor | once, some day |
| -ido | *utód* | *descendant (affix)* |
| -igi | *vmivé tesz; műveltetés (tárgyas i.)* | *to make, causaive verb (affix)* |
| -iĝi | *vmivé válni* | *to turn into sg, become sg (affix)* |
| -inda | *vmire méltó* | *to be worthy of sg (affix)* |
| infano | gyerek | child |
| ili | ők, azok | they |
| -ilo | *eszköz-, szerszámképző* | *tool, instrument (affix)* |
| -ino | *nőneműsítő képző* | *feminine (affix)* |
| inter (*elölj.*) | között | between, among |
| iri | menni | to go, walk |
| ia | valamilyen | some kind of |
| io | valami | something, anything |
| iom | valamennyi,valahány | all, every |
| -isto | hiv. foglalkozásképző | -er, *(affix of profession)* |
| iu | valaki | somebody, enybody |
| ja | hisz, csakugyan, ám | but, realy, indeed |
| jam | már | already |
| jaro | év | year |

| | | |
|---|---|---|
| je (elölj.) | -kor | at (*point of time*) |
| jen | ime | see! |
| juna | fiatal | young |
| ĵeti | dob, vet | to throw |
| ĵus | épp most | just |
| kaj | és | and |
| kanto | ének, dal | song |
| kapo | fej | head |
| ke | hogy | that |
| kelkaj | néhány | some of, a number of |
| kial | miért | why |
| kiam | (a)mikor | when |
| kie | hol | where |
| kiel | (a)hogyan; mint | how |
| kio | mi | what |
| kiom | mennyi | how many |
| klara | tiszta, világos | clear |
| knabo | fiú | boy |
| knab*ino* | lány | girl |
| kies | (a)kié, (a)kinek a … | whose |
| kiu | ki; aki, ami | who |
| koloro | szín | colour |
| komenci | kezdeni | to begin, start |
| kompreni | megérteni | to understand |
| koni | ismer | to know |
| konsilo | tanács, javaslat | advice |
| konstrui | építeni | to build |
| kontraŭ | ellen, ellenében | against, opposite |
| korto | udvar | court, yard |
| kosti | kerül vmennyibe | it cost … |
| kredi | hinni | to believe |
| kreski | nő, növekszik | to grow |
| krii | káltani | to cry, shout |
| krom (*elölj*.) | kívül (*nem helyhat*.) | except |
| kun (*elölj*.) | -val, -vel (*társhat*.) | with |
| kune | együtt | together |
| *kun*helpi | segitkezni | to help |
| kuraĝa | bátor, merész | courageous |
| kuri | futni | to run |
| kvankam | bár | though, although |
| kvar | négy | four |
| kvazaŭ | mintha | as if |
| kvin | öt | five |
| la (*hat. névelő*) | a, az | the |
| labori | dolgozni | to work |
| labor*ema* | dolgos | diligent |
| labor*isto* | munkás | worker |
| lando | ország | land, country |
| lasi | hagyni | to let, leave |
| lasta | utolsó | last |
| laŭ (*elölj*.) | szerint | acording to |
| lern*ejo* | iskola | school |
| lerni | tanulni | to learn, study |
| letero | levél | letter |
| levi | emel | to lift |
| li | ő (*hímn*.) | he |
| lia | az ő vmije (*hímn. birt. névm*.) | his |
| libera | szabad | free |
| libro | könyv | book |
| lingvo | (beszélt) nyelv | language |

| | | |
|---|---|---|
| lito | ágy | bed |
| loĝi | lakni | to live |
| loko | hely | place, room |
| longa | hosszú | long |
| ludi | játszani | to play |
| lumi | világít | to light, give light |
| mal- | ellentétesítő képző | un- |
| *mal*amo | gyűlölet | hatred, hate |
| *mal*havo | szükség | need, necessity |
| *mal*lumo | sötétség | darkness |
| manĝi | enni | to eat |
| manĝ*aĵo* | étel | food |
| manĝ*ilaro* | evőeszköz | cutlery |
| manki | hiányzik vmi | to be missing |
| mano | kéz | hand |
| maro | tenger | sea, ocean |
| mateno | reggel | morning |
| mem | (ön)maga | oneself |
| meti | tenni, rakni | to put |
| mil | ezer | thousand |
| milito | háború | war |
| mir*inda* | csodálatos | wonderful |
| mondo | világ | world |
| mon*ero* | pénzérme | coin |
| mono | pénz | money |
| monto | hegy | mountain |
| montri | mutatni | to point, shaw |
| morgaŭ | holnap | tomorrow |
| movi | mozgatni | to move |
| multa | sok | much, many, a lot of |
| muro | fal | wall |
| nacio | nemzet | nation |
| nask*iĝi* | születni | to be born |
| naŭ | kilenc | nine |
| ne | nem | no, not |
| necesi | szüksége van vmire | to need |
| nek…nek… | sem… sem… | neither… nor… |
| nelonge | nemsoká | soon, before long |
| nenia | semmilyen | no, not … any (*pron.*) |
| nenie | sehol | nowhere |
| nenio | semmi | nothing, none |
| ni (*szem. névm.*) | mi | we |
| nigro | fekete | black |
| nigr*ulo* | néger | negro |
| nomo | név | name |
| nova | új | new |
| nu | no | well, … (*int.*) |
| nun | most | now |
| nur | csak | only, but, merely |
| oceano | óceán | ocean |
| ofte | gyakran | often |
| ok | nyolc | eight |
| okazi | történni | to happen |
| okulo | szem | eye |
| okupi | elfoglalni | to occupy |
| oni | ált. alany | one (*instead of noun*) |
| paco | béke | peace |
| pagi | fizetni | to pay |
| paroli | beszélni | to speak |
| parto | rész | part |

| | | |
|---|---|---|
| pasi | múlni | to pass (away) |
| patro | apa | father |
| peco | darab | piece |
| pensi | gondolni | to think |
| perdi | elveszíteni | to lose |
| permesi | megengedni | to allow, permit |
| persono | személy | person |
| peti | kérni | to ask for, request |
| plena | tele | full, filled |
| plenumi | teljesíteni | to perform |
| plenum*iĝi* | teljesedni | to be realized |
| plu | tovább(ra is) | … on; in the future too |
| porti | visz, cipel | to carry, take |
| premi | nyom, szorít | to press |
| preni | fogni, venni | to catch, take |
| preta | kész | ready |
| preter (*elölj.*) | vmi mellett el- | past (*prep.*) |
| prezenti | bemutatni | to introduce, present |
| piedo | láb(fej) | foot |
| plej | felsőf. jele (*mnév előtt*) | -st, most (*superlative*) |
| pli | középf. jele (*mnév előtt*) | -er, more (*comparative*) |
| popolo | nép | people |
| por (elölj.) | -ért; számára, részére | for |
| pordo | ajtó | door |
| post (elölj.) | után | after |
| postuli | követel | to claim, demand |
| povi | -hat, -het; tud (vmit tenni) | can |
| preskaŭ | majdnem | almost, nearly |
| pri (*elölj.*) | -ról, -ről; -ra, -re (*képes helyh.*) | about (*prep.*) |
| pro (*elölj.*) | miatt (*okhat.*) | because of, on account of |
| proksime | közel(ben) | near, not far |
| propra | saját | own, proper |
| provi | (meg) próbálni | to try |
| punkto | pont | point; full stop |
| pura | tiszta | clean, clear |
| rajto | jog | law, right |
| rakonti | elbeszélni, elmesélni | to tell, narrate |
| rapida | gyors | rapid, fast, quick |
| re- | vissza- | re-, back(ward) |
| regi | uralkodik | to rule, rein, |
| *re*memori | visszaemlékezni | to remember |
| renkonti | találkozik | to meet |
| respondi | felelni | to answer, reply |
| resti | maradni | to rest, remain |
| ricevi | kapni | to get, receive |
| riĉa | gazdag | rich |
| rigardi | nézni | to look at |
| rimarki | megjegyezni | to remark |
| rimedo | mód(szer) | method, mode, way |
| ruĝa | piros | red |
| ruĝ*igi* | pirosít | make red |
| sama | ugyanaz | the same |
| scii | tudni | to know |
| se | ha | if |
| sed | de, hanem | but |
| sekvi | követni | to follow |
| semajno | hét | week |
| sen (*elölj.*) | nélkül | without (*prep.*) |
| sendi | küld | to send |
| sento | érzés | feeling |

| | | |
|---|---|---|
| serĉi | keresni | to look for |
| si | (ön)maga (*visszah. névmás*) | oneself (*reflexive pronoun*) |
| sia | az ő saját vmije | own |
| sidi | ülni | to sit |
| simpla | egyszerű | simple |
| sinjoro | úr | Mr |
| skribi | írni | to write |
| sola | egyedül | alone |
| sole | csupán (csak) | only |
| soni | hangzani | to sound |
| stari | állni | to stand |
| sub (*elölj.*) | alatt; alá | below, under (*prep.*) |
| suno | nap | sun |
| super | fölött; fölé (*tárgye.-tel*) | above, over (*prep.*) |
| supre (*elölj.*) | fent | above, up |
| sur (*elölj.*) | -on, -en, -ön; -ra, -re | on (*prep*) |
| ŝanĝi | változtat, kicserél | to change |
| ŝajni | látszani | to seem, look |
| tablo | asztal | table |
| tago | nap | day |
| tamen | mégis | nevertheless |
| tempo | idő | time |
| teni | tart, fog | to hold |
| tero | föld | ground, earth |
| tia | olyan | so *(+ adj.)* |
| tial | azért, ezért | therefore |
| tiam | akkor | then, at that time |
| tie | ott | there (*place*) |
| tien | oda | there (*direction*) |
| timi | fél | to fear (sg) |
| tiom da | annyi, ennyi vmiből | so much of sg |
| tiri | húzni | to pull |
| tiu | az a, aki, ami | who, that, which |
| tra (*elölj.*) | át, keresztül | through (*prep.*) |
| trankvila | nyugodt | quiet |
| tre | nagyon | very (+ *adj.*) |
| tri | három | three |
| trinki | inni | to drink |
| tro | túl(ságosan) | too (+ *adj.*) |
| tuj | azonnal | immediately |
| turismo | turizmus | tourism |
| tuta | egész, összes | all |
| -ujo | tartály, tartó | *container (affix)* |
| -ulo | egyed-, egyénképző | -er, *etc. (affix of person)* |
| unu | egy | one (*number*) |
| urbo | város | town, city |
| urb*ano* | városi egyén | townsman |
| uzi | használni | to use |
| valora | értékes | valuable |
| varma | meleg | warm |
| veni | jönni | to come |
| vento | szél | wind |
| vera | igazi | thrue |
| vespero | este | evening |
| vesto | ruha | clothes |
| veturi | utazni, szállítani | to travel, transport |
| vi | te, maga, ön | you |
| vid*ebla* | látható | visible |
| vidi | látni | to see |
| vid*indaĵo* | látnivaló | sight(s), places of interest |

| | | |
|---|---|---|
| viro | férfi | man |
| vir*ino* | nő, asszony | woman |
| vivi | él | to live |
| vizaĝo | arc | face |
| vizaĝ*aĉo* | pofa | gall, cheek |
| vojaĝo | utazás | travelling |
| voli | akarni | to want, wish |